km for de laĝetoj. En la parko de la kastelo estas sportejoj, romantikaj vojoj, banejo ktp. Vi povas partopreni prelegojn, esperantajn koncertojn, ludojn, diskuti pri nia movado, pri ĝia historio kaj perspektivo. Kompreneble ne mankos vesperaj diskotekoj, la tradicia balo, diversaj ekskursoj, libroservo kaj ankaŭ la nokta babilejo kun bufedo.

Aliĝilo por IJS '93

Familia nomo: _____ viro virino

Persona nomo: _____ Naskiĝjaro: _____

Preciza poŝta adreso: _____

Lando: _____ Telefono: _____

Mi deziras loĝi kun: _____

Mi estas vegetarano nevegetarano. Mi ne manĝos surloke

Post IJS mi volas veturi al IJK en Bulgario: jes ne

La partoprenkotizon mi pagis en kategorio A / B / C / D

- al UEA en Rotterdam, favore al la kodo ELLS-S.
- al Zalaegerszeg, favore al Hungara Esperanto-Junularo.
- al Budapest, favore al Hungara Esperanto-Junularo.
- Mi promesas pagi tuj post la alveno.

La sumo de mia pago: Partoprenkotizo: _____

Rabato: _____

Krompago: _____

Entute: _____

Dato: _____ Subskribo: _____

Kotiztabelo (aliĝoj ĝis 01.07.1993.)

Kategorioj	Litoj en ĉambro	Landoj Y	Landoj X
A.	2-lita	310 gld.	12 000 Ft.
B.	4-5 lita	270 gld.	10.000 Ft.
C.	8-10 lita	220 gld.	7.000 Ft.
D.	propra tendo	190 gld.	6.000 Ft.

Landoj X: Albanio, Ĉeĥio, Bulgario, Hungario, landoj el eksa Jugoslavio, Litovio, Estonio, Latvio, Polio, Rumanio, Slovakio, landoj el eksa Sovetio.

Landoj Y: la kromaj landoj.

Rabatoj:

- Kontribuantoj al la programo ricevas 5-10%-ojn de rabato. (-post anticipa konfirmo.)
- Membroj de Hungara Esperanto-Junularo ricevas 2000 Ft-ojn de rabato.
- Kiuj ne manĝas surloke ricevas 3000 Ft-ojn resp. 60 gld.-ojn de rabato (landoj X, resp. Y).

Krompagoj:

- Aliĝintoj post 01.07.93. krompagas 500 Ft. resp. 30 gld. (landoj X, resp. Y).
- Tiuj aliĝintoj de IJS '92, kiuj sen malaliĝo simple ne alvenis krompagas 500 Ft. resp. 30 gld. (landoj X, resp. Y).

Kondiĉoj:

- Via aliĝo validas post la ricevo de la pago. (Por hungaroj kaj landoj Y.)
- Por la aliĝintoj el la landoj X, escepte Hungarion, kiel aliĝdato validas la ricevdato de aliĝilo.
- Malaliĝi eblas ĝis 01.07.93. Ĝis tiam ni povas resendi vian aliĝkotizon minuse 10%.
- Post 01.07.93. la kotizo ne estas repagebla, sed estas transdonebla al alia persono per skriba atestilo de la originala aliĝinto.
- La kotizo ne inkluzivas la veturkostojn de IJS al IJK. Ĝi estas surloke aparte pagenda.
- Hungaroj pagu la kotizon al Hungara Esperanto-Junularo, H-8901 Zalaegerszeg, pk. 263. aŭ al konto: MHB 315-10976 (Budapest IX., Móricz Zs. körtér 6.).

Vian kotizon sendu al *Universala Esperanto-Asocio (UEA-ELLS-S, Nieuwe Binneweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)*, nepre indikante nian kodon ELLS-S,IJS.

Vian aliĝon kaj programproponojn sendu al:

Hungara Esperanto-Junularo, H-8901 Zalaegerszeg, pk. 263., Hungario.

Ni invitas vin al la
37-a Internacia Seminario
 de Germana Esperanto-Junularo
27.12.1993 - 03.01.1994
 en Neumünster (Nordgermanio)



RILATOJ INTER ŜTATOJ

Aliĝu frue al la 37-a IS!

kotizoj estas indikitaj en germanaj markoj (DEM):

Plena kotizo: aĝo je 27.12.1993	aliĝo antaŭ 01.10.1993	aliĝo antaŭ 01.12.1993	poste
0 - 13 jaroj	180	220	260
14 - 20 jaroj	210	240	280
21 - 26 jaroj	230	260	300
pli ol 26 jaroj	270	320	360

Memzorgantoj	aliĝo antaŭ 01.11.1993	aliĝo antaŭ 01.12.1993	poste
ĝis 26 jaroj	90	100	110
pli ol 26 jaroj	130	140	150

Krompagoj: Germanoj, kiuj ne estas ordinaraĵoj de GEJ aŭ GEA 60
 partoprenantoj pli ol 40-jaraj krome 60

Rabato:

por partoprenantoj (en aĝo de 14-26 jaroj) el Albanio, la baltaj ŝtatoj,
 Bosnio-Hercegovino, Bulgario, Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Pollando,
 Rumanio, Serbio, Slovakio, Slovenio kaj la ŝtatoj de eksa Sovetunio 40

por kontribuantoj al la programo 10-25 DEM, laŭ interkonsento ankaŭ pli

Bonvolu legi la kondiĉojn sur la venonta paĝo !

Aliĝilo por la 37-a Internacia Seminario

skribu latinajn presliterojn!

Familia nomo: _____ ina malina

Persona nomo: _____ nask.: _____
u-mm-jj

Adreso: _____
urbo

urbo kun poŝtkodo

Hejmlando: _____ Telefono: _____
esperante internac

Ne plenu:

--	--	--	--	--

Legu nepre:

- La plena kotizo inkluzivas la programon, loĝadon kaj manĝojn en la junulargastejo, krome la silvestran bufedon.
- La memzorganta kotizo inkluzivas la amasloĝejon (nur se ekzistas tia!) sed NE la manĝojn en la gastejo (ni kontrolos!). Tamen la silvestra bufedo estas jam pagita per la kotizo. En la amasloĝejo nepre bezonatas dormsako kaj matraco. Vi bezonas konfirmilon ankaŭ por la amasloĝejo. Se ne ekzistas tia, vi devos plenpage loĝi en la domo.
- Eblas partatempa partopreno sed ni favoras plentempajn aliĝojn, nur unu monaton antaŭ la IS ni disdonos la ankoraŭ liberajn lokojn al partatempaj aliĝintoj laŭ pagdato. La kotizo por partatempuloj estas la plej alta kotizo en la respektiva agkategorio, dividita per sep, multobligita per la nombro de partoprentaĝoj. Se vi ne eksplicite indikas partatempajn partoprenon en via aliĝilo, ni konsideras vin tuttempa kaj plenkotiza partoprenanto. Vi povas ŝanĝi la daŭron de via partopreno ĝis plej malfrue la 01.12.1993.
- Vi povas certi pri lito nur se vi frue aliĝas kaj ricevas konfirmilon de ni. Malfrue-aliĝintoj riskas neakcepton. Nepre kunportu vian konfirmilon!
- Via aliĝo estas transdonebla al alia persono, kondiĉe ke la malaliĝinto konfirmas sian rezignon kaj nomas la anstataŭanton skribe. Ni alĝustigas la kotizon, kiu ne povas malaltiĝi.
- Por ĉiu aliĝanto necesas aparta aliĝilo, do grupa aŭ listigita aliĝo ne estos akceptata.

Kiel aliĝi:

- La aliĝo de esperantistoj el Albanio, la baltaj ŝtatoj, Bulgario, Rumanio kaj la ŝtatoj de eksa Sovetunio ekvalidas post ricevo de la aliĝilo.
- GEJ ne sendas invitilojn al unuopuloj.
- La aliĝo de esperantistoj el Bosnio-Hercegovino, Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Pollando, Serbio-Montenegro, Slovakio kaj Slovenio ekvalidas post alveno de 20 gm per kontroĝiro, aŭ per sendo de 15 internaciaj respondkuponoj aŭ monbiletoj en germana aŭ usona valutoj (sendo je via propra risko!).
- La aliĝo de esperantistoj el aliaj ŝtatoj ekvalidas post ricevo de 50 gm.

BONVOLU KUNPORTI LA PRUVILON PRI VIA PAGDATO KAJ -SUMO!

Vian aliĝilon sendu al:

Marc Steßgen
Hagedornstr. 6a
D-W-5000 Köln 80
nova poŝtkodo ekde 01.07.: D-51069 Köln

Vian pagon sendu al:

Poŝtĝirokonto **545 77 - 754**
(bankokodo: **660 100 75**)
en Karlsruhe je la nomo
"Germana Esperanto-Junularo"
kun indiko "37-a IS".

Mi aliĝas kiel:

- tuttempa partoprenanto
- partatempa partoprenanto
- Mi ŝatus manĝi vegetare

Se eblas, mi volas loĝi kune kun:

- _____
- Mi estas memzorganto (mi nek loĝas nek manĝas en la IS-ejo)
- Kiel memzorganto mi ŝatus loĝi en la gimnastikejo, SE EBLAS.

Mi legis kaj agnoskas la suprajn kondiĉojn.

Precipe mi konscias, ke mia aliĝo validas nur ekde la alveno de mia antaŭpago ĉe GEJ

- Mi ankaŭ ŝatus ricevi pli da informoj pri la IS-preparseminario KES!*

Dato: _____ Subskribo: _____

Saluton!

Malbonon oni ne memoras, sed bonon oni ĉiam gloras.

La agrablaj memoroj pri la 33-a IS en Neumünster igis nin denove inviti vin tien.

Kaj kial? Por paroli pri

Rilatoj inter Ŝtatoj,

do temo de granda aktualeco kaj ĉiam kreskanta signifo.

Demandoj abundas, sed respondoj apenaŭ videblas:

- kiel solvi la konfliktojn de internaciaj interesoj kaj "Ŝtatalternaj aferoj"?
 - kiagrade la "monda komunumo" rajtas kaj kapablas enmiksiĝi dum "internaj konfliktoj", precipe dum militoj? Ĉu ekonomia forto rajtas justigi internacian politikan trudemon? Kio pri Ŝtata memstareco?
- Kiom potencaj estas la Unuiĝintaj Nacioj, la Internacia Kortumo en Ĝenevo, la diversaj "daŭraj" konferencoj de KSKE ktp.?
 - Ĉu la Homaj Rajtoj internacie agnoskatas, ĉu ili sufiĉas kiel internacia leĝaro?
- kiel realigi senmilitan konfliktsolvadon?
 - ... kaj ne laste ni rigardu la historion de interŝtataj rilatoj ekde la "Paco Romia" (Pax Romana) ĝis la "Ligo de Popoloj" kaj la politikaj "blokoj" ĝis hodiaŭ; kaj eble ni provu eltrovi kiel lingvoj influas la kunvivadon de nacioj.

Same kiel ĉiujare ni esperas je via vigla kontribuemo. Memoru ke ju pli frue vi sendos viajn ideojn, des pli bone por ĉiuj. Do sendu viajn kontribuideojn al:

Por la tema programo:

Martin Burkert
Henri-Dunant-Str. 61-63/311
D-W-4300 Essen 1
nova poŝtkodo ekde 01.07.: D-45131 Essen

Por la distra programo:

Kerstin Engelke
Möllner Str. 9, 2/19 b
D-O-2520 Rostock 25
nova poŝtkodo ekde 01.07.: D-18109 Rostock

Prepariĝu !

La 19-an ĝis la 22-a de aŭgusto okazos en Kolonjo la ĉi-jara Kolonja Esperanto-Semajnfino (5a KES). La renkontiĝo funkcias kiel IS-preparseminario kaj la temo logike estos la IS-temo "Rilatoj inter Ŝtatoj". Sed ne nur la tema programo gravas; vi ankaŭ havos la eblecon, jam iomete senti la grandegan IS-etoson ekz. dum promeno tra la malnova urbocentro de Kolonjo, dum vizito en naĝejo, dum la disko-vespero ktp.

Do, se vi venos al IS, venu ankaŭ al Kolonjo, la urbo kun la plej bona biero de la mondo !
Informpetu per la IS-aliĝilo!



☆
NANCY

Kursoj plu normale funkcias. La elementa finiĝis dum marto kaj tuj komenciĝis daŭriga per "Gerda malaperis" (ĉiumerkrede). Jaŭde je la 18a alterne funkcias 2a kaj 3a grada kaj konversacio. Ĉiufoje ĉeestas de 3 ĝis 10 personoj.

Nova triagrada kurso - Post enketo al diversaj interesatoj, tia kurso povos starti oktobre. Estis proponitaj la lundo, la mardo aŭ la sabato posttagmeze. La plej multaj interesatoj (8-9 personoj) elektis la lundon posttagmeze unufoje monate. Principe ĝi povus starti la lundon 11an de oktobro. La horaro proponita estus de la 14a (aŭ 14h15 ĝis la 17a (aŭ 17a15). La diversaj interesatoj bonvolu informi min, ĉu tiuj dato kaj horaro taŭgas. Se ne ili proponu aliajn daton kaj horaron. Estas koncernataj ges. HUBERT, s-in°j NARDI, MOUREAUX, FRANCOIS, ROUGIEUX, FRICOT, TOMASI, s-r° MOITRIER.

Kondiĉoj: jara kotizo 180F, libro 108F ("Faktoj kaj Fantazioj")

Perkoresponda kurso - 53 komunikoj al la gazetaro (plus 11 preparataj la 15an de aprilo): el ili aperis almenaŭ 21. Ĉirkaŭ 70 personoj petis informojn. Sed ĝis nun aliĝis nur 14. El ili jam 2 finlernis: F-in° MALLINGER Marie-Agnès, 55000 BAR-le-DUC (gvidita de P. Denis) per "Metodo M11" kaj S-in° HENRY Mireille, 54 HEILLECOURT (gvidita de S-in° Paradis) per "Junulkurso". gratulojn!

Gazet-artikoloj pri E° kaj la lingvo-problemo - Dankon al tiuj el vi, kiuj sendas al mi la artikolojn pri tio. Ĉi-jare mi jam povis liveri al niaj instancoj **26 paĝojn** laŭ formato A4 (lastjare 22 paĝoj). Okazis en tuta Francio relative multaj reagoj al diversaj artikoloj malfavoraj al E°, tiel ke la revuo "Science et Vie" ekzemple dediĉis paĝon dum 4 monatoj por aperigi resumojn el tiuj leteroj.

Ni ankaŭ rilatis kun la skipo COUSTEAU, kun kiu kunlaborado ŝajnas ebla (ĉi-ene en tiu bulteno vi trovos la tekston **-en esperanto-** de la peticio, kiun iniciatis tiu skipo, pri la "Rajtoj de la Venontaj Generacioj"). La franclingvan tekston (peticio + "Rajtoj") vi povas mendi al "Equipe Cousteau" - Pétition, 75809 PARIS CEDEX 17. Atentu!... La peticio finiĝos en septembro, oni devas **antaŭ tiu dato** sendi la plenigitajn foliojn.

Sabataj staĝoj en Nancy =====

Daŭre ekzistas la ebleco funkciigi tiajn staĝojn, unu sabaton monate, ĉu de la 10a ĝis la 17a, ĉu de la 14a ĝis la 18a. Interesatoj bonvolu konigi sin al la respondeculo. Tri gradoj estas eblaj 1a, 2a kaj 3a, tamen por la 3a-grada, nun ekzistos la lunda kurso; kredeble ne estos ebleco por 2a-grada... 3a grado por la sabato! Sed kompreneble staĝo funkcios nur se, sufiĉe frue, sufiĉa nombro da interesatoj anoncos sin.

Pri la turisma prospekto =====

... vi jam legis en ĉiuj lastaj "Informiloj"; venis multe da mendoj el la tuta mondo... krom el nia regiono! Se vi deziras ĝin, bonvolu skribi al "Office de Tourisme, 14 Pl. Stanislas, 54000 NANCY. Ne forgesu peti la prospekton en Esperanto!... kaj petu plurajn: por viaj korespondantoj, gelernantoj... bopatrinoj ktp!

Tiu turisma prospekto ne estis tute senutila. Pro ĝi, la "Internacia Centro de Restado" (kaj Junulgastejo en Kastelo Rémicourt, Nancy) kontaktis min kaj proponis kunlaboron. El tio rezultas la jeno:

= Prelego pri Esperanto la vendredon 13an de junio, je la 20a30 en la Kastelo Rémicourt.

= Ekspozicio pri E° estos elmontrata en la kastelo laŭ la disponebleco de la materialo, principe meze de julio ĝis fine de aŭgusto. Dum tiu periodo, lastjare, tranoktis tie 2500 ĝis 3000 gejunuloj el multaj landoj. Tiu ekspozicio estos montrata en la enirejo. Krom la tranoktintoj, loĝantoj de la sudaj kaj okcidentaj kvartaloj de la "nancia distrikto" ofte vizitas la kastelon, ĉar ĝi situas en ripoziga 9-hektara parko, kaj la eventoj estas anoncataj ne nur de la gazetaro sed plie de la specifaj urbaj paneloj elektronikaj. Vesperaj provlecionoj povos foje okazi se sufiĉaj intereseatoj.

= **Plus staĝo:** Krome okazos (prove) **6-taga staĝo** por komencantoj, de la 19a ĝis la 24a de julio, ĉiam en la Kastelo. Mi aparte verkis franclingvan programon (ankaŭ ŝovitan en ĉi-tiun bultenon), ĉar temas pri aranĝo dediĉata al franclingvanoj. Se vi konas interesiĝemulojn... **nepre informu ilin!** (fotokopiu la aluditan dokumenton!).

= **Krome, pri la Kastelo mem:** Unua prospekto -nigra/blanka- tuj aperos en esperanto, pri la Centro. Krome, kolora eldono aperos venontjare, se la intereso estas sufiĉe granda. Petu la unuan al la Kastelo de Rémicourt, 149, Rue de Vandoeuvre, 54600 VILLERS-lès-NANCY.



ACTIVITE ESPERANTO

STAGE D'ETE REMICOURT
Monsieur J.P. COLNOT
15, Rue de Lavaux
54520 LAXOU

Tél. 83.27.95.55



CHÂTEAU de REMICOURT

Centre d'Accueil International



STAGE D'INITIATION A L'ESPERANTO

Madame, Monsieur,

Un stage d'initiation à la langue ESPERANTO aura lieu au CENTRE D'ACCUEIL INTERNATIONAL DU CHATEAU DE REMICOURT - 149, rue de Vandœuvre - 54600 VILLERS-LES-NANCY, pendant six jours du 19 au 24 JUILLET 1993 inclus. ☆

☆ Le CHATEAU DE REMICOURT est un équipement de la VILLE DE NANCY, situé à 5 kms de la Place Stanislas, au coeur d'un parc de 9 ha.

Le programme comprend une étude intensive de la langue ; mais aussi des intermédiaires vacances sont prévus : chaque jour 4 à 5 leçons d'une heure entrecoupées de poses. Le programme comprendra d'autre part beaucoup d'autres possibilités, chaque jour initiation ou hatha-yoga pour les personnes intéressées ; visite du jardin botanique proche, visite de différents musées de NANCY et de l'HOTEL DE VILLÉ, son et lumière, etc... ☆

Il n'y a pas de limite d'âge.

☆ La cotisation prévue pour ce stage est de : 1 200 Francs par personne en pension complète y compris tous les repas ; le logement en chambre de 2 à 4 personnes, le manuel de cours et quelques-unes des visites indiquées. En demi-pension, vous ne payerez que : 930 Francs par personne. Egalement possibilité de camping à proximité. *

A l'issue du stage les élèves pourront passer le premier examen de l'ESPERANTO ; ils seront mis en relations avec des correspondants étrangers.

Pour vous inscrire à ce stage, envoyez le bulletin d'adhésion ci-joint avec la somme de : 200 Francs représentant les droits d'inscription. Le solde sera à régler à votre arrivée. ☆

☆ Ce stage ne fonctionnera que si DIX personnes au moins sont intéressées. Si le stage est annulé, vous serez intégralement remboursé.
Si, au dernier moment, vous ne pouvez venir, vous abandonnez les droits d'inscription.

* Mode de calcul des frais de séjour :
= nuit : 45F - petit déjeuner : 12F - autre repas : 45,50F

STAGE D'INITIATION A LA LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO
CENTRE D'ACCUEIL INTERNATIONAL DU CHATEAU DE REMICOURT

NOM, PRENOM :
DATE DE NAISSANCE :
ADRESSE :
N° de Téléphone :
LANGUES DEJA ETUDIEES :
PROFESSION :



Ci-joint la somme de : 200 Francs représentant les droits à l'inscription
Parmi les éléments du programme proposé, serez-vous intéressé par les cours de HATHA-YOGA ?

La visite de Musées (avez-vous des préférences ?) Visite du jardin botanique, de l'aquarium, piscine.

Avez-vous d'autres suggestions ?

Une confirmation vous sera adressée à la suite de votre adhésion.



☆
BAR-1e-DUC

La 10 gestudentoj de la "Instituto por Fortigi la Vendistojn" -IFV 55-, gviditaj de S-r° F.-X. GILBERT, kiuj alfrontis la 1a-gradan ekzamenon de Franca E°-Instituto (vid. "La Informilo" 81) ĉiuj sukcesis: temas pri CHAHATE Mohamed, CUPIDON Angelo, DONETTI Jean-Marie, FRIRY Richard, GEROME Marc, GUILLAUME Carine, LATIFI Azeddine, SILBERMANN Dany, SILVY Sandrine kaj TERIO Corinne.

Sian E°-diplomon ili ricevis kune kun la staĝ-diplomon de IFV-55, okaze de protokola evento, en salono de AMIFOP.

Sinceran gratulon al la freŝbakitaj laŭreatoj kaj al ilia kurs-gvidinto!

La klubo, kiu gastigis argentinan samideanon antaŭ nelonge, denove akceptos novan "esperanto-ambasadoron", nome la prezidanton de la E°-Asocio de KUBO, Juan Ramon RODRIGUEZ GOMEZ, kiu turneas en Belgio kaj Francio antaŭ ol viziti la Universalan E°-Kongreson en VALENCIA.

Jen nova aŭto-ralio!

Jam trifoje aprezis la klubanoj -kaj "najbaraj" esperantofonoj kaj simpatiantoj- la originalecon de l'aŭto-ralio aŭtuna, kiu ebligas al ili konatiĝi kun pitoreskaj anguloj de la departemento Meuse.

Helpe de facila demando, la skipoj (1 veturilo) malkovras sian itineron kaj solvas kultur-riĉigajn enigmojn. Ĉio finigas per komuna pikniko en plej gaja etoso. Memkompreneble estas premiitaj la 3 unuaj perfektaj solvintoj!

Ĉi-jare, la "evento" okazos la **dimanĉon 19an de septembro**. Starto... mezmatene, disiĝo tagmez-fine. Ĉu vi ne dezirus ĝui denove tiun "aventuron"?... Evidente jes! Bonvolu plenigi la ĉi-suban slipon kaj vi ricevos siatempe la necesajn teknikajn informojn.

Invitu viajn parencojn aŭ konatulojn eĉ ne-esperantofonojn!

► Sendu vian aliĝilon al: S-r° F.-X. GILBERT, Vert Coteau, F-55000 LONGEVILLE-en-BARROIS



13a de septembro 1993

=== ALIĜILO AL LA ESPERANTO-AUTO-RALIO ===

Grupo Esperanto-Meuse

Nomo nombro da personoj

Adreso ev. telefon-numero

intencas partopreni la proponitan ralion kaj ricevos siatempe la necesajn kompletigajn informojn.

Dato
Subskribo



D-r° Ludoviko, Lazaro ZAMENHOF (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto kaj lia edzino Klara, nas- kita Silbernik (1863-1924) havis tri infanojn: la plej aĝa, la filo **Adamo** (1888-194...) fariĝis me- dicindoktoro. Ni memoras, ke lia patro estis okul- isto. Sofia, la unua filino (1892-1942) iĝis kura- cistino pri internaj malsanoj. Lidja (1904-1942) atingis la gradon de magistrino pri juro.

Ĉiuj bone praktikis la internacian lingvon kaj ofte partoprenis diversajn aranĝojn kaj solenaĵojn de varsoviaj esperantaj societoj, digne reprezen- tante la familion **Zamenhof**. Sed la plej aktiva kaj fervora praktikantino estis la plej juna infano de la paro, **Lidja**, karese nomita "**Lili**"...

Ŝi naskiĝis la 29an de januaro 1904, en Varso- vio, en la tiama gepatra loĝejo, strato Dzika 9, -ek de 1931, **Zamenhof-strato**-.

Ĉarma kaj petolema knabino estis Lidja. Ekde la infanaĝo ŝi piano-ludis, ankaŭ ŝatis pentri, mon- tris nemalŝatindan talenton. Iu esperantistino, Juli Wolfson, foje vizitinta la familion, konsta- tis, ke "ŝi" -la sesjara blondulineto- plene kom- prenis la signifon de la vorto "ĉokolado"... Fak- te, la etulino ne tro emis "esperantiĝi" kaj, krom "ĉokolado"-n, ŝi konis nur la esprimon "bonan nok- ton"... Sed kiam estis okazonta la **9a Universala Kongreso** en **BERNO** (Svisio), la patrino admonis ŝin, aludante la fakton, ke oni ne komprenos ŝin!

Sekve, Lidja, dum ses semajnoj, mirinde progres- sis je la ellernado de la lingvo! En Berno, la ge- patroj kaj Lidja renkontiĝis kun Adamo kaj Sofia, kiuj tiam studis medicinon en **Lozano**.

Jarojn poste, kiam D-r° Zamenhof pro malsano ne kapablis labori, kaj ripozis sur sofo, Adamo per violonĉelo kaj Lidja, akompanante sian fraton per fortepiano, provis iom konsoli la patron per muzi- ko. En 1913, Lidja eniris la okan klason de la Re- ala Lernejo por Inoj de la Societo de la Kooperati- va Lernejo en Varsovio, kiun ŝi vizitadis ok ja- rojn. En majo 1921, Lidja plenumis la "maturec- ekzamenon". En 1925, ŝi ricevis la titolon de ma- gistrino pri juro... Tiam ŝi estis **21 jar-aĝa!** Tamen, al la jurista profesio ŝi ne dediĉis sin: la genia kreaĵo de la patro plene allogas kaj ab- sorbos ŝin...

Dum la 16a universala Kongreso en VIENO en 1924 ŝi estis elektita kiel provizora sekretariino de Internacia Studenta esperanto-Asocio. En 1930 ŝi akiris diplomon de instruistino de Esperanto laŭ la metodo "Ĉe"*. Ravita pri ĝi, ŝi skribis al Sin- jorino Julia Isbrucker **: "Mi-mem instruas Espe- ranton, mi konas ĉiujn malfacilaĵojn de la instru- ado kaj estas sekve sufiĉe kompetenta, por ĝuste taksi la elstaran kurson de S-r° Cseh. Mi sentas sinceran admiron al tiu vere genia pedagogo kaj grandan dankon al la organizintoj de la kurso, pre- cipe al vi, kara Sinjorino".

Ekde nun, Lidja instruos Esperanton laŭ tiu me- todo en Varsovio kaj en multaj lokoj eksterlande. En la fino de 1932 ŝi gvidas kursojn en Gdovle kaj en aliaj urboj de Svedio.

Poste, sian laboron ŝi daŭrigas en Francio en

1933: Romans, Châteauroux, Lyon, Grasse, Vence kaj Marseille. Printempe 1934 Lidja partoprenas la Provencan Esperanto-Kongreson en St-Raphaël kaj honorĉeestas inaŭguron de la Zamenhof-straton. 1934: Franca Esperanto-kongreso en Bordeaux. Nela- cigeble ŝi traveturas la landon. Kun S-r° Borel ŝi parolas antaŭ mikrofono de radio-stacio Lyon II. Jen ŝi denove eksterlande dum la Universala Kon- greso de Stockholmo. Reveno al Francio kiel gvi- dantino de novaj kursoj: Châteaurenard, Orléans, Thiers, Romans, Clermont-Ferrand, Moulins kun ak- ceptoj far urbestroj. Ŝi prezidas en Perpignan la jaran konferecon de la Federacio "Langvedoko- Rusijono". Sin sekvas kursoj en Villeurbanne, Oul- lins, Villefranche. En 1935 Lidja inaŭguras en Ro- mans placon dediĉitan al sia patro. Gastino en la Universala Kongreso de Romo, ŝi "flugas" norden por gvidi kurson en **Hagenau**. Alvoko de la grupoj de St-Etienne, Toulon, ktp... Samtempe ŝi kunlaboras kun diversaj esperanto-gazetoj...

Se la iniciatinto de esperanto siajn religiajn sentojn esprimis antaŭ ĉio en la "Preĝo sub la verda standardo" kaj "Hilelismo", Lidja-n plene kaptis kaj ensorbis la nova universala religio -bahaismo-, fondita de Perso, Baha'y'llah (1817-1892). Tial ŝi atingas Usonon por prelegi en orga- nizaĵoj de la bahaa movado kaj intertempe gvidi E°-kursojn: Nov-Jorko, Filadelfio, Detroit, Balti- more...

S-in° Roan Orloff Stone en Nov-Meksiko tiel pri- skribas sian renkontiĝon kun Lidja:

"Estis la 31a de decembro 1937, antaŭvespero de la novjaro.. Mi alproksimiĝis al la blonda, silen- ta, verdflave vestita "musetto", kaj mi vidis du belajn okulojn, sed plenajn je soleco... Mi kom- prenis, ĉar ankaŭ mi estas jud-devena. Kiel unu "Ĉe-metoda instruistino" al alia, mi diris "Bonan vesperon! Roan Orloff mi estas... Kiu estas vi?" Tuj, per la magio de tiuj Esperantaj vortoj, per la feliĉa sento de tiu mondfama Ĉe-metoda prezen- tiĝo, tuj la malĝoja vizaĝesprimo ŝanĝiĝis al ri- deto... Eĉ rido brilis en la bluaĵ okuloj, dum ŝi respondis: "Mi estas Lidja Zamenhof!"...

Lidja tradukis multajn verkojn: "Universala Pa- co", la Celo de Nova Mond-Ordo", ktp. Ŝi revenis Varsovion la 10an de decembro 1938 kaj plu-aktivis en loka esperanto-movado, prelegante pri la lingvo kaj daŭre gvidante kursojn.

Impresema kaj delikatsenta, Lidja tiel aŭgure skribis al amiko en Provenco, la 26an de majo 1939: "Jes, mi estas pli juna al vi, sed baldaŭ povas veni tempo, kiam ĵureco kaj forto restos senpovaj kontraŭ furiozo malkatenita de homaj manoj, kiam la milita monstro malfermos laŭkegon. Pli sekura vi estas tiam en izolita bieneto en Provenco, ol mi en la ĉefurbo. Sed antaŭ ĉio ni devas memori, ke ni estas ĉiuj en la manoj de Dio. Ni dependas de Li, Li estas nia rifuĝejo kaj ŝildo. Kiel ajn nigraj estas la nuboj super la ĉielo de la homaro, kiel ajn teruraj tondroj el ĝi paŝos, pa- sosta nuboj kaj denove ekbluos super la mondo la ĉielo".

La 1an de septembro 1939, germanaj trupoj inva- das Polujon. Dum la sieĝo de Varsovio estis detru- ita far aviadilbomboj la domo ĉe strato Krolewska

41, kie, sur la 3a etaĝo, troviĝis la loĝejo de Ludoviko Zamenhof. Post la morto de la gepatroj, en la vasta kvinĉambra apartamento loĝis Adamo, lia edzino, D-rin° Vanda kun la filo Ludoviko, ankaŭ D-rin° Sofia kaj Mag. Lidja. Diversaj memoraĵoj pri la iniciatinto de la lingvo estis pie konservataj en la loĝejo. Ankaŭ la kabineto, en kiu li kutimis labori, restis preskaŭ senŝanĝa. Post detruo de la domo, la familio Zamenhof eklogis ĉe ges-r°j Minc. Janina Minc estis fratino de Vanda.

Kelkajn tagojn post okupo de Germanio, estis arestita en juda hospitalo Adamo Zamenhof, plenumanta tiam funkciojn de ĉef-direktoro. La saman tagon oni arestis lian edzinon, Vanda, kaj la fratinojn, Sofia. Samtage -jes!- Lidja kaj D-r° Minc -kiu ne estis esperantisto- suferis similan sorton. Ekde januaro 1940, Adamo kaj S-r° Minc ne plu troviĝis en la varsovia malliberejo Pavjac. Restas hodiaŭ tute nekonataj la precizaj cirkonstancoj de ilia morto...

Post okupo de Pollando la Germanoj tuj komencis persekuti la civilan loĝantaron, precipe la judan. Jam ekde novembro 1939 ĉiuj judoj, plenkreskuloj kaj infanoj devis surhavi la specifan "senhonorigan" flavan stelon sespintan... En novembro 1940 estis kreita getto, tuj ĉirkaŭata de altaj muroj kun pikdratoj supre. Varsovio terure "famigis" pro tiu abomena karcerego... En tiun fermitan kaj severe garditan spacon -relative ne granda- oni enŝtopis pli ol 400 000 judojn el la ĉefurbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Ege teruraj iĝis la vivkondiĉoj. Regis malsato, malsanoj... Morto forrabis multajn personojn. En tiu varsovia geto troviĝis ankaŭ la restantaj membroj de la familio Zamenhof: Vanda kaj Sofia deĵoris kiel kuracistinoj, junulo Ludoviko, en oficejo, Lidja instruis... la anglan lingvon!

Julio 1942: komenciĝas ekstermado de la getto-loĝantaro far la Germanoj. Perforte kaptitajn judojn -virinojn, maljunulojn, malsanulojn... kaj infanojn- oni premamasigis en porbestajn vagonojn kaj sendas al Treblinka, kie, en 10 gas-kameroj, forpasos miliono da homoj. En Oswiecim (Auschwitz) ĉirkaŭ tri milionoj da judoj estis murditaj... kaj pli ol unu miliono da ne-judoj... Du milionoj pereis en la murdejoj Majdanek, Sobibor, Belzec kaj en diversaj aliaj koncentrejoj.

Aprilo 1943 -do antaŭ 50 jaroj...- la getto estas definitive "likvidita". Oni eĉ "ebenigis" la lokon per tertransportoj. Iom antaŭe nobla pola esperantisto, Jozef Arsenik, volis savi Lidja, kasantante ŝin... Ŝi rifuzis, esprimante la nepran deziron ne forlasi la parencojn... Ŝi ja sciis, ke tiujn homojn, kiuj alportas helpon al judoj, minacas mortpuno. Doktorinoj Janina kaj Vanda -kun la filo Ludoviko- sukcesis sin savi... sed la du filinoj de la kreinto de Esperanto pereis kun milionoj da sam-gent-anoj. Ankaŭ la sama sorto trafis aliajn parencojn de D-r° Zamenhof...

Tre mallonga estis bedaŭrinde la vivo de "Lili" Entuziasme kaj fervore ŝi daŭre agis por disvastigi la ideojn kaj la idealojn de sia amata patro. Ŝi ankaŭ kredis, ke la nova religio alportos savon al la turmentata homaro...

Nobla, bonkora, altanima, idealismo-plena, servopreta estis Lidja Zamenhof... Indan lokon en la Esperanta Panteono ŝi meritas...

Honoron al ŝia memoro!

(resumis Odette SCHEIDEL)



- * "Ĉe"-metodo: Tute nova (siatempe), rekta instru-metodo, ellaborita de Andreo CSEH (ĈE) en la rumana urbo SIBIU ekde 1920. Ĝeneralaj principoj: neuzado de lernolibroj, de nacia lingvo, sed klarigo de la novaj vortoj per la jam lernitaj; uzado de konkretaj objektoj; aplikado de konversacio pri aktualaj oĝ anstataŭ uzado de sekaj ekzemploj; klopodo atingi, ke la lernantoj mem eltrovu la regulon entenatan en la ekzemploj. La sukceso de la kurso laŭ tiu metodo multe dependas de la talento kaj personeco de la instruisto.
- ** Julia ISBRUCKER fondis kun Andreo CSEH, en HAGO (Nederlando), en 1930, la tiel nomatan "Internacian Csen-Instituton de Esperanto". Ambaŭ ankaŭ lanĉis la faman revuon "La Praktiko"-n, kiu preskaŭ seninterrompe aperis de 1932 ĝis 1970.

pour vous initier à la seule vraie langue internationale, pour vous perfectionner ou éprouver le plaisir rare de converser en espéranto...



nos stages, nos congrès, nos rencontres, nos voyages...

24h. sur 24

La aperdato de ĉi-tiu n° de "L.I." ne ebligas mencii la tro proksimajn eventojn, pri kiuj ni estis petitaj informi. (La abunda dokumentaro pri la SAT-Kongreso en Kazanlak (BG) bedaŭrinde ne plu povus utili)

Ni tamen anoncu: **Esperanto-Seminario kaj Kongreso** komune organizataj de I.K.U.E., la E°-Asocioj de Baden-Württemberg kaj Sarlando, Rheinland-Pfalz kaj Romolo. **22/24ajn de oktobro** (postkongreso la 25an) en D-67059 LUDWIGSHAFEN. Tre riĉa progr° **Aliĝilo** havebla ĉe Sigrid KÖNIG, Speyerer Str. 80, 68535 NECKARHAUSEN.

el nia libro-servo de notre "livre-service"



POUR UN ESPERANTISTE
LA "JOURNEE DU LIVRE"
DURE TOUTE L'ANNEE!

LIBRO-SERVO
12, Rue E. d'Orves
F-54490 PIENNES

Kio estas Esperantisto, kiu nek aĉetas librojn kaj nek legas? Jes, kia esperantisto li estas? uz-modo:

Simpla mendo-poŝtkarto.
Baldaŭa libropakaĵo
kun interna fakturo via
kaj danko anticipa.
pro via pago tuja!

NOVAĴOJ SUR NIA LIBRO-BRETO

"Vojaĝoj kaj aliaj poemoj" - Edwin de Kock

Temas pri lia deka poemaro originala en la internacia lingvo, kun prozaĵo: "Pri mia verkado". Interesa libro por tiuj, kiuj ŝatas poezion kun kelkaj neologismoj. - 147 paĝoj - 65 frankoj

"Ŝia lasta poŝtkarto" - Serĝo Elgo

Jen prezento de Giorgio Silfer: " Subtila fadeno ligas nian krimliteraturon al la tradicio de romano intermilita: pli psikologie ĉe Valano, pli fikcie ĉe Nemere, pli ironie ĉe Elgo. Inter la stilisma Valano kaj la enhave originala Nemere, Serĝo Elgo sin proponas kiel sintezan proziston, kiu partoprenas en la virtoj de ambaŭ... La originaleco de Serĝo Elgo, probable lia plej fajna trajto, situas ĝuste en lia (mem) ironia realismo: survoja al satiro kaj cedema al tentoj de magio. Danke al tio, la unua romano de nia franca verkisto estas sendube pli ol klasika krimromano".

- 225 paĝoj - 110 F

"La nokto de la ezoko" - Serĝo Elgo (lia dua romano)

En perdita vilago de la franca provinco, viro, baldaŭ mezaĝa, esploras teruran sekreton, kiu rongadas lian animon ekde la adoleskaj jaroj: ĉu lia patro kulpas pro perfido al partizana taĉmento, ekstermita dum la germana okupacio? Temas pri romano delikate psikologia. - 171 paĝoj - 80 F

"Kroatia milita nokt-libro" - Spomenka Ŝtimec* - (terure aktuala mesaĝo)

"... Geamikoj, parencoj, najbaroj, kolegoj... nun estas la tempo ĉesigi la malamon. Ne gravas, kiu komencis la unua, kiom da ŝojoj. Mi al neniu koleras, ĉar mia edzo estas mortigita. Ne daŭrigu! Ĉe la restaĵoj de mia edzo, mi petas vin, pardonu kaj longesu ĉiujn nepagitajn kalkulojn. Antaŭen ni iru! Ni ne permesu, ke niaj infanoj kaj niaj nepoj iam denove ekbatalu. De ni tio dependas. Ni faru nian eblon. Estu ni la komenco de la paco, pri kiu ĉiuj parolas..."


- 103 paĝoj - 86 F

* (ni bone memoras pri Spomenka, kiu gvidis seminarion dum unu el niaj staĝoj)

=====

**** rapide... efficace ...

NOTRE COURS D'ESPERANTO
PAR CORRESPONDANCE



- ☆ un matériel moderne
- ☆ une technique éprouvée
- ☆ un réseau d'animateurs compétents
- ☆ un savoir immédiatement opérationnel

UNE ADRESSE



"Activité ESPERANTO"
MJC Ph. Desforges
27, Rue de la République
54000 NANCY

=====

PETICIO POR LA RAJTOJ DE LA VENONTAJ GENERACIOJ

La troloĝateco kaj la senbrideco de la homaj aktivadoj estigas teruran minacon por niaj posteuloj.


La Deklaro pri homaj rajtoj, kiu proklamas ĉies liberecon kaj egalecon, estas ducentjara. Tiu ĉi belega teksto ne plu sufiĉas.

Ni postulas, ke estu solene deklaritaj la rajtoj de la venontaj generacioj, por ke ĉiuj homoj heredu neinfektitan planedon, kie ĉia formo de vivo povos disvolviĝi.

Subskriboj sendotaj
antaŭ septembro 1993



Jacques-Yves Cousteau



Jean-Michel Cousteau

Subskribante la peticion de la Skipo Cousteau, mi petas la ŝtatestrojn de la tuta mondo uzi sian influon por ke la Unuiĝintaj Nacioj kalkulu kun la rajtoj de la venontaj generacioj.

NOMO (en majuskloj)

ADRESO

SUBSKRIBO

Por Eŭropo kaj Afriko, bonvolu resendi la peticion al:
Equipe Cousteau - Pétition
75809 Paris Cedex 17
France

Por Amerikoj, Azio kaj Oceanio, bonvolu resendi la peticion al:
The Cousteau Society - Petition
930 West 21st Street, Norfolk
VA 2351 USA

Fotokopioj estas akceptitaj

sekvo aliflanke



Equipe Cousteau



Skipo Cousteau



The Cousteau Society


PETICIO POR LA RAJTOJ DE LA VENONTAJ GENERACIOJ

La troloĝateco kaj la senbrideco de la homaj aktivadoj estigas teruran minacon por niaj posteuloj.

La Deklaro pri homaj rajtoj, kiu proklamas ĉies liberecon kaj egalecon, estas ducentjara. Tiu ĉi belega teksto ne plu sufiĉas.

Ni postulas, ke estu solene deklaritaj la rajtoj de la venontaj generacioj, por ke ĉiuj homoj heredu neinfektitan planedon, kie ĉia formo de vivo povos disvolviĝi.

Subskriboj sendotaj
antaŭ septembro 1993



Jacques-Yves Cousteau



Jean-Michel Cousteau

Subskribante la peticion de la Skipo Cousteau, mi petas la ŝtatestrojn de la tuta mondo uzi sian influon por ke la Unuiĝintaj Nacioj kalkulu kun la rajtoj de la venontaj generacioj.

NOMO (en majuskloj)

ADRESO

SUBSKRIBO

Por Eŭropo kaj Afriko, bonvolu resendi la peticion al :
Equipe Cousteau - Pétition
75809 Paris Cedex 17
France

Por Amerikoj, Azio kaj Oceanio, bonvolu resendi la peticion al
The Cousteau Society - Petition
930 West 21st Street, Norfolk
VA 2351 USA

Fotokopioj estas akceptitaj

sekvo aliflanke



Equipe Cousteau



Skipo Cousteau



The Cousteau Society



"DANKON!..

...Magio. Amikeco. Skiado. La ponto sen fino en Avignon. Cent dancoj kaj kantoj ĉe Annsibyll. La Rejno. Vento. La Alpoj florantaj. Kaj Suno... Jes, mia indiana "Inti", kiu brilegis por ni en Vieno! Havenoj kaj neĝo. Spreewald. Prelegoj. Laboro. Ridado. Roterdamo. Otavo. Berlino. Parizo. Milano... kaj Moskvo. Verdaj steloj kaj flagoj en stacidomoj kaj flughavenoj. Amikoj ĉie! Kaj ĉiam: **Revenu!**... kaj ankoraŭ centoj kaj miloj da travivaĵoj vivantaj en mia memoro pri tiom da noktoj, en kiuj Luno lulis min sub nordhemisferaj steloj!!...

Dankon! Jes, dankon al vi Jens, al vi Marijke kaj Osmo, al vi Marcel, Eevi, al vi Jarek kaj Hans, al... al vi ĉiuj, ĉar dank' al vi miaj paŝoj tra viaj landoj havis alian melodion, pli plenan je ĉarmo kaj amikemo.

Kaj neniam forgesu, ke sude de la Ekvatoro etendiĝas vasta, verda kaj sunoplena mia lando, kie gastame kaj simpatie atendas vin mia hejmo.

Vi restas vivantaj en mia koro."

Atilio ORELLANA ROJAS

Casilla de Correo 1428
RA - 5000 CORDOBA

Kara Samideano,

=====

Kiel kutime, mi sendas al vi mian ĉekon por reaboni **La Informilo**-n. Mi ne volas forgesi la okazon diri al vi, ke mi daŭrigas ŝatigi la rimarkindan kvaliton, tiel de la prezento kiel de la enhavo, de tiu-ĉi revuo, kaj mi tutkore gratulas, pere de vi, la efikan skipon de via Federacio.

Fidele via,

J.-R. CHASLE
22650 PLOUBALAY

=====

Noto de la redaktoro - Ni ricevis el S-r^o J. DOUBLET ...6-paĝan leteron, kiun ni kompreneble ne povas aperigi ĉi-tie en ĝia tuteco!! Jen la "privata" parto -responde al S-r^o PIRLOT, kiu siatempe konigis sian opinion pri eventuala sinteno de la esperantofonoj rilate al la angla lingvo-. Ni taksis tamen intresinde aperigi aliloke en nia bulteno 2 paĝojn, kiuj tutcerte iĝos helpvaloraj kiel traduk-ekzerco...

... ..

Jean Doublet
785, Chemin du Peyrouas
06640 Saint Jeannet

1993 04 03

"La Informilo" n^o 80
"Kion fari rilate la anglan?"

Al S-r^o G. Pirlot,

Estimata Sinjoro,

Estimata Sinjoro,

Vi konsilas, ke oni karesu la anglan lingvon laŭ la direkto de ĝiaj haroj. Tio ne devas malpermesi diri kaj skribi, ke post 1500-hora lernado oni povas nur uzi ĝin en unu direkto: francigen. Tiu direkto estas sendube tiu de la kareso... kaj ĝenerale de ĉiuj etnaj haroj...

Kion oni faru per lingvo, kiu ebligas nur legi (14/20) aŭ aŭskulti (10) kaj ne skribi (7) aŭ ĉefe ne paroli (3)?

Claude Piron diras proksimume: kun Baccalauréat, 6% el la gejunuloj sukcesas kompreni simplan anglan tekston. Plue tiuj devas resti 3 jarojn en lando, kie oni parolas la anglan, por komenci redakti angle. Oni bezonas 10 000 hora-vivon aktivan antaŭ korekte skribi!

... ..


Kore salutas,



distra angelo



OBLIKVA KRUCENIGMO KUN KAŜITA PROVERBO ☆



Dekstren malsupren

1 finaĵo de la aktiva futuro. 2 frakcioj. 3 opozicias, kontraŭstaras. 4 numeralo - opo de dek aferoj. 5 miksaĵ' el kunfanditaj metaloj - preparolataj aferoj. 6 havas delikatan odoron - individuaoj. 7 **la unua parto de la proverbo**. 8 rektangula - lasta vorto de preĝoj - epoko, longa tempo - spaco. 9 pezo de la pakmaterialo - loĝanto de Arabio - granda rabobirdo. 10 nia najbara planed' - virseksa infano - spirebla gas miksaĵo. 11 tre religiemaj, diotimaj - aserto defendata de iu persono - kunliga interplektaĵo de ŝnuroj. 12 **la dua parto de la proverbo**. 13 kaŭzos, instigos - aŭdorganoj. 14 prezentejo de cirko - faros inon nedefinitan/familiare/. 15 forta teno, apliko de forto sur ion - universala kongreso. 16 laboras per pioĉo. 17 fermil' de akvotubo. 18 bildkarto.

Maldekstren malsupren

9 organiza komitato/ml. 10 vicmontra numeralo. 11 plenaĝa. 12 unubranca nefermita koniko/kurbo. Ago de tiu, kiu movas ion al/post/si - speco de freneza murdemo. 14 paŝas - sufikso de la pasiva prezenca participo-prepozicio uzata antaŭ distribuaj numeraloj. 15 faroj - korinklinis - rivero en eks-Sovetio. 16 eksperiment' - akcepti ion kiel veraĵon/rad./ - havos en la mano. 17 rilata al reproduktado de libroj aŭ gazetoj - kriple, malgrandegule - subitaj, komencaj. 18 en kiun direkton - team' de estroj - aŭdigos bruon kiel fluganta insekto. 19 elemento/Br/ - infaneto - instrumentoj. 20 mola pasto - fekunda loko en dezerto - part/et/oj. 21 kemia simbolo de natrio - granda arbara plandmarŝanta besto - grupaj. 22 malgranda monkvant' - faras, estas aktiva. 23 supera oficiro/preskaŭ ĝeneralo/. 24 daŭre sonanta sono. 25 elemento/J/. 26 anglalingve:ne.

verkis MARĈEK

SILABENIGMO ☆

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vort-eroj, malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj vertikale legataj, elformas proverbon (Zam.)
av cle ĉar di ek eno eta fo go ĝa jak kti ku le lo ma mo ni no no ob ple pi po ra ro
rose si ti to to ul ulo ur var ze zi

1 leĝe mortigi krimulon	+ - - + - - -
2 ĉe fenestro, kofro...	+ - - + - - -
3 kunigi interkrucigante	+ - - + - - -
4 lago	+ - - + - - -
5 haltloko	+ - - + - - -
6 ŝipo	+ - - + - - -
7 sek-vinvero	+ - - + - - -
8 noktbirdkanto	+ - - + - - -
9 vizaĝosto	+ - - + - - -
10 cerealo	+ - - + - - -
11 havena kajo	+ - - + - - -
12 ne suferas malfruon	+ - - + - - -
13 svisa urbo (sen artiklo)	+ - - + - - -
14 mara rabisto	+ - - + - - -
15 premokupi la spiriton	+ - - + - - -


= Charade "à tiroirs" =
(en français)

Mon premier est un assassin
Mon deuxième s'acquitte de ses dettes
Mon troisième est un portraitiste
Mon dernier contredit violemment
Mon tout "débâbelise"...

(envoi de Raymond BORÉ)

Iu pastro ĵus enposteniĝinta en nova paroko ricevas plend-informojn de la mastrumantino:
"Via Pastra Moŝto, via tegmento bezonas riparojn, via hejtilo ne plu bone funkcias...
- Nu, Delfino, jam de dek jaroj vi loĝas ĉi-tie... Kial vi ne diras **nia** tegmento, **nia** hejtilo?"

Kelkajn semajnojn poste, la pastro ricevas viziton de la episkopo kaj de najbaraj pastroj. Subite alkuras kaj ekkrias Delfino: "Patro Mia, Patro Mia, mi ĵus vidis muson en **nia** ĉambro, sub **nia** lito!..."



SOLVOJ de la lastaj enigmoj - "La Informilo" n° 81
KRUCVORT-ENIGMO: "Unu floro ne estas krono, unu monero ne estas mono".
SILAB-ENIGMO: "Sincereco de la koro pli valoras ol oro".